

Ateismo

Bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto Organizo

<http://www.gazetoteko.eu/ateo/ateo08.pdf>



La celoj de ATEO

- 1 **Kunligi** esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn.
- 2 **Disvastigi** Esperanton inter ateistoj.
- 3 **Defendi** propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neŭtralajn Esperanto-grupojn.
- 4 **Instigi** ĉe neŭtralaj Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe nereligiaj grupoj se oni varbas ĉe religiaj grupoj.
- 5 **Akceli** racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem kaj strebi altiĝi la intelekta kaj kultura nivelo de Esperantujo.
- 6 Libere **diskuti** kaj **analizi** ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn rilatajn sociajn problemojn.
- 7 **Malkateni** la mensojn!

N^o 8-a (de la nova epoko)

Julio 2009

Vortoj de l' Prezidanto:

Karaj samideanoj,

Jen fine nia bulteno ATEO! Ĝi ne aperis pasintjare, tamen tio ne signifas, ke nenio okazis intertempe.



Dum la Universalaj Kongresoj en Jokohamo en 2007 kaj en Roterdamo en 2008 ATEO havis budo en la movada foiro. Tie ĉe tablo ni povis informi pri ateismo kaj nia asocio. Denove estos tia budo en la UK en Bialistoko.

Kiel kutime la dumkongresaj forumoj allogis multajn homojn kaj naskis interesajn debatojn. Post la UK en Jokohamo Dominique Simeone kaj mi mem parolis ĉe France Culture (unu el la ĉefaj oficialaj radio-kanaloj en Francio) kadre de ĉiudimanĉa elsendo 'Divers aspects de la pensée contemporaine' (diversaj aspektoj de la nuntempa pensado). Ni parolis pri la celoj de ATEO, pri ĝiaj forumoj dum UK, pri la ligoj inter Esperanto-movado kaj ateismo, kaj pri ĝiaj historio kaj perspektivoj. La teksto de la elsendo aperis en franca revuo 'La raison'. Jen guto malgranda! Mi ŝatus, se en ĉiu lando okazus la samo...

Kaj antaŭ nelonge aperis "La dek du pruvoj pri neekzisto de Dio" de Sébastien Faure, en traduko kaj eldono de Christian Rivière.

Ĉu reviviĝas religioj? Jen demando, pri kiu ni debatos en la forumo en Bialistoko. Kaj nia administra kunsido estos okazo por preparoli nian estonton kaj eble ŝanĝi la nunan konsiston de nia estraro. Bonvenon en la kunsidoj!

Ĝis baldaŭ en Bialistoko, aŭ/kaj sur la reto, ateisme via,

Claude Nourmont

Grava letero

Altestimata kaj timata ĉiupova homo:

Mi adresas vin venigi peton, kiun mi esperas, ke vi povu respondi.

Eble vi jam aŭdis pri mi: mi estas Dio, tiu estaĵo, kiun vi kreis antaŭ tiom multe da jaroj, kiam via speco apenaŭ malsimilis la ceterajn bestojn. Kiam nekono, timo, deziro protekti sin kaj ignorantecon igis vin tiom vundebla, kiom la ĉiu ajn alia besto.

Vi kreis min je via imago kaj simileco, ornamita per ĉiuj virtoj kaj malvirtoj viaj. Tiutempe estis eĉ amuze esti Dio, aŭ pli bone dirite, dioj, ĉar viaj bezonoj estis tro multaj por kontentiĝi per nur unu dio.

Vi kreis min sklava al viaj kredoj kaj bezonoj. Vi imagis min sub diversaj formoj kaj atributoj. Ĉiu nova kredanto ligis, kaj ligas sin, per nova ĉeno, postulante al mi helpi lin aŭ ŝin rimedi lian aŭ ŝian doloron kaj ignorantecon.

Min vi kreis, nin vi kreis, kiam vi ankoraŭ ne komprenis la mondon, kiu ĉirkaŭflankigis vin kaj la leĝojn, kiuj regas ĝin. Kiam vi ignoris, ke povas ekzisti leĝojn, kiuj regas la mondon kaj universo. Tial vi kreis min. Nin vi kreis tiom frenezaj, nin vi kreis laŭ viaj propraj fantazioj kaj timoj. Tiel frenezaj, kiel nur menso de infano povas krei fantoman amikon por helpi lin.

Mia historio, Sinjoro, estas tre malgaja: ĝi estas la historio de esto kreita por rimedi viajn timojn, ambiciojn kaj malsanojn.

De la unua momento mi estis uzata kiel pravigo por ĉiu krimo kaj egoismo de via speco.

Oni uzis min por justigi viajn militojn, por pravigi la povon, kiuj kelkaj homoj alprenis, por ke kelkaj homoj mastru aliajn, por devigi siajn normojn kaj kredojn, dirante, ke ili fontas el mi. Por ke kelkaj homoj proklamu sin voĉoj de mia volo, miskvalifikante, je nomo mia, ĉiujn aliajn, kiuj ne kredu je siaj vortoj.

De la unua momento vi kreis militojn inter ni por justigi interesojn viajn. Nin vi utiligis por justigi viajn dezirojn konkeri, venki la kontraŭulon, submeti lin.

Nin vi uzis por pravigi la sennombrecon da mortintoj, vunditoj, torturojn, kiujn tiuj militoj kaŭzis kaj kaŭzas.

Nin vi uzis por pravigi malamojn viajn, via englutismon, vian venĝodezirojn.

Mi ne kredas, ke estas malbono en tio, ke vi ne voku nomon mian. Mi kredas, Homo, ke ne estis evento en via persona historio kaj kolektiva, kie oni ne vokis mian nomon, aŭ niajn nomojn, por defendi viajn interesojn manifestajn kaj kaŝitajn.

Je mia nomo, kaj je niaj nomoj, oni faris kaj daŭre faras buĉadojn sennombrajn, kaj krimojn, kiuj ne havas alian justigon ol vian propran intereson.

Sub apero de estaĵoj infinite povaj, ni estas nur sklavo de kredoj viaj, ĉar sklavaj vi kreis nin, kaj sklavaj ni restas, kaj tiel ni daŭros ĝis kiam vi liberigu nin el niaj katenoj, kiujn vi konsideras justaj, kredante ke vi laŭdas nin kaj ke ni ŝatas ilin.

Ili estas la samaj katenoj, per kiuj povuloj de via speco ligas vin, kiam ili diras, ke ili

interpretas volon nian, niajn mortojn, kaj dezirojn niajn.

Via speco, Homo, progresis multe, ne tiom multe kiom vi devus, ĉar je nomo nia ankaŭ oni provis malhelpi la progreson de scienco, oni kreaĉis egajn mensogojn, terurajn falsaĵojn celante halti ĝian progreson, oni murdis kaj detruis tiujn homojn kaj verkojn, kiuj malfermis truojn en muroj de ignoranteo.

Sed spite al ĉio, oni progresis sufiĉe por ke vi ne plu bezonu kredi en magiaj estaĵoj kreitaj de via imagopovo antaŭ multe, multe da tempo.

Spite al ĉio vi nun scias, ke la mondo, la universo, estas regata de leĝoj, ne de volo mia, ne de volo nia. Ankoraŭ mankas al vi malkovri multajn leĝojn, kiuj ankoraŭ kaŝiĝas al vi, sed eĉ se vi ankoraŭ me konas ilin, vi jam suspektas, ke ili ekzistas, vi jam scias pri ili.

Sekve, vi ne plu bezonas nin, vi ne plu bezonas magiajn estojn, kiuj gvidu paŝojn viajn en mallumo kaj ignoranteco. Prenu en viajn manojn la gvidilojn de via destino, kaj ekkonu la leĝojn, kiuj regas ĉion, kaj lasu min, lasu nin ripozi pace.


Uzu min ne plu por justigi viajn ambiciojn, viajn dezirojn, viajn interesojn, viajn krimojn aŭ viajn troigojn.

Tial, Homo Ĉiopova, mi adresas al vi tiun ĉi leteron, petante vin, ke vi liberigu min el katenoj viaj, kredoj viaj, ignoranteco via kaj timoj viaj.

Ĉiun fojon, kiun vi sentas la tenton kredi pri mi, demandu al vi kiu kreis kiun, se dio homon, aŭ homo dion?

Tial, Sinjoro, Homo Ĉiopova, mi petas, liberigu min el sklaveco al kiu vi submetas min, lasu min malaperi en nenion, tiu nenio el kiu vi iam kreis min, kreis nin, je imago kaj simileco viaj.

Transkribis: Marisa




Senĝenaj dialogoj

verkis Alberto Fernández (eldono Stafeto 1971/ 200 paĝojn)

Mi hazarde trovis tiun ĉi libron en la libro-servo de Greziljono (fakte komitatano de la kultur-domo ĝin konsilis al mi). Mi ne scias ĉu tiu libro furoris post sia apero en 1971, sed se ne, tio plian fojon elmontrus la gravan mankon de atento al la scienca kulturo ĉe esperantistoj. Pli freŝdate (2006), la apero de la libro «Relativeco per bildoj» de Wilfrid Arkinson, restis seneĥa, kio estas plia ilustrado de tiu fenomeno.

Ambaŭkaze, tiuj libroj estas tre respektemaj al la lingvo, eĉ sufiĉe belstilaj, cetere cerbumigaj. Ĉiu en sia propra epoko, prezentas la plej modernajn scienco-sciojn kaj pensmanierojn laŭ originala angulo kaj flua stilo. Mi krome ne prisilentu ilian pedagogian kvaliton.

«Senĝenaj dialogoj» estas la plej ambicia el ambaŭ, des pli se konsidere ke, en 1971, ĝi certe troviĝis ĉe la pinto de la homaj konoj en fiziko. Ĝi instruas pri sciencaj konceptoj rilate al la materio, la gravito, la relativeco, la tempo, la universo, la kurbiĝo de la spaco-tempo, la kvantumeco de la energio, de la materio kaj eĉ de la tempo. Ĝi vizitas la makrokosmon, la mikrokosmon, la atomon, la partiklojn (mi ne memoris ke jam en 1971 oni konis tiom da). Ĝi prezentas, ĉe la limo de filozofio, utilajn nociojn, kiel ekzemple la determinismon de la makromondo, kaj la aleatorecon de la mikromondo. Ĝi pli specife insistas pri esenca nocio, nome la entropio, pri la natura evoluo de ĉiu sistemo al entropio-kresko,



do al senordeco de la mondo (absoluta malordo de la universo, kaj implicite maksimumo de entropio, signus la finon de la universo kaj la ĉeson de la tempo), kontraŭ kio intervenas la natura selektado. La libro demonstras, laŭ tiam tre avangarda tezo, la rolon de la mikromondo (kaj de ties aleatoreco), la kontraŭan rolon de la natura selektado, tra la intera mondo de ĉeloj, de virusoj, de genoj, de kromosomoj..., en la genero de la vivo. Paĝon post paĝo, evidentiĝas ke la materio en si mem, kapablas krei la vivon. En la du lastaj ĉapitroj, oni eĉ ne

hezitas longigi tiun karakterizon de la materio al la homa inteligenteco, al la homa memkonscio.

«Senĝenaj dialogoj» estas prezentita sub formo de dialogo inter ĉioscia kaj instruema onklo, kaj liaj sciavidaj genevoj. La humuraj, viglaj kaj trafaj demandoj de la genevoj pruvas ke ili ne estas absolute senciaj, kio plirapidigas kaj vigligas la pritrakton de la diversaj temoj.

Miaj intereso kaj atento estis kaptitaj de la komenco ĝis la fino, eĉ la lasta parto (lasta triono), kiam la libro subite devigiĝas de fiziko al natura scienco (nome genetiko), kio kutime tendas min.

Aliflanke, malmultas la lingvaj problemoj, se ne estus kelkaj ig aŭ iĝ troaj aŭ mankantaj, kaj la sistema uzo de «sole» anstataŭ «nur».

La libro nur sporade aludas al la religiaj vidpunktoj, laŭ toleremaj, nemokemaj, kaj trafe evidentaj rimarkoj, ĉefe ĉe la prezentado de la (mal)determinismo. La religiaj tezoj tiel krude miskongruas en la panoramo, ke ne utilis ilin tro insiste kontraŭi ĉi-kuntekste. Des pli ke la religioj mem estas tipe homa produkto kiu plian fojon, iel pruvas la eksterordinaran kapablon de nia genro, konjekti, supoziti, fantazii, adaptiĝi al nova realo.

El tiuj aludoj, mi selektis: *«Kial la homa specio fariĝis la plej superrega en la naturo? Kaj kiel ni klarigu la krestan pozicion, kiun Homo sapiens okupas sur la kurbo de la biologia evoluo? Jen demandoj, kies pristudo malkovras nemezureblajn konsekvencojn por nia scienca sinteno, por nia mondkoncepto, eĉ por nia morala konduto?» ... «... Dum*

miroj da jaroj la homo konsideris sin mem kreitaĵo aparta de la cetera vivularo. Ĉu ĝia pens- kaj krekapablo ja ne decide pruvis ĝian nekontesteblan — eĉ neatingeblan! — superecon en la biosfero? El tiu prakonvinko fontas plejmulto de la religiaj kredoj, filozofiaj doktrinoj kaj dogmoj. El ĝi ankaŭ rezultis nia tumulte tragika historio.»

Mi konsilas la legadon de tiu ĉi libro al ĉiuj, eble pli specife al ateistoj, kaj mi fine sugestas ke ateista asocio povus instigi al ĝisdatigado (eble necesa pri kvantiko, intrikado, unuiga teorio de la kvar interagoj de la materio, malĉifro de la genotipo, ...), reeldono kaj denova sukceso de tiu libro.

Recenzis Christian Rivière

Rimarko

Ekzistas en Esperanto kelkaj radikoj etimologie sorbitaj de religia signifo. Mi citu «adiaŭ» (radiko ne vere utila), «maten», «vesper», «sabat», «dimanĉ». Mi speciale malaprobis tiujn du lastajn, ĉar estis facile trovi alian solvon, nome «saturd» kaj «sund», laŭ la angla-lingva maniero, tiel farante ke ĉiuj tagnomoj finiĝu per «d», tiel daŭrigante la similecon al la nomoj de la «planedoj» videblaj de la prauloj, nome kaj laŭorde: la Luno, Marso, Merkuro, Jupitero, Venuso, Saturno, la Suno, eĉ se oni ja scias nun ke ne ĉiuj estas planedoj. Estus tiel facile forviŝi kelkajn religiajn referencojn. Cetero estus io pozitiva por la reguleco, la logikeco kaj la neŭtraleco de nia lingvo. Sed ĉu Zamenhof volis sian lingvon neŭtrala rilate al la religio?

Christian Rivière

La ribelo de ateistoj (traduko)

La teologo Hans Küng, aŭtoro de la furorlibro. Ĉu dio ekzistas? kritikas la karikaturan aliron al la religio de Richard Dawkins «la dia iluzio aŭ la dia frenezo»

Laŭ intervjuo en «Le temps» de Genevo la 19an de aprilo 2008

Le temps: La pensuloj de la movado «Novaj ateistoj» fortege atakas la religion kaj asertas, ke ili volas detrui ĝiajn intelektan kaj moralan pretenojn. Ĉar ne eblas pruvi la ekziston de dio. Kiel vi reagas al ĉi tiuj tezoj?

Hans Küng: Fakte la aktuala debato kontribuas, per nemultaj novaj sciencaj argumentoj, kontraŭ la ekzisto de dio, sed malfermas polemikon kontraŭ la religio ĝenerale, kaj la kristanismo speciale. Per argumentoj komplete unuflankaj, tamen mi komprenas la fonon de ĉi tiu polemiko. Multaj nuntempuloj koleras pro la islama fanatikismo kaj la teroristaj atakoj. Aliaj ekscitiĝas pro la personkulto ĉirkaŭanta la papon kontraŭa al la evangelio, same kiel la restaŭraj tendencoj ene de katolika eklezio, nome en la kampo de la liturgio kaj de la teologio. Ankaŭ aliaj alarmiĝas pro la spaco kiun okupas la kreistaj tezoj en diversaj usonaj lernejoj kaj universitatoj. Fine ekzistas ankaŭ ekscitiĝo kontraŭ politikuloj kiel Bush, kiu kredas ke li povas pravigi militojn en Afganio kaj Irano pretekstante, ke dio estas je lia flanko.

En via lasta libro «Eta traktato pri la komenco de ĉio» vi skribas, ke «la moderna scienco devus kaj necese devas sindeteni prikonsideri Dion», kaj vi alvokas al gardado de propra sfero de ĉiu disciplino kaj al komplementeco. Sed la novaj ateistoj opinias, ke la reciproka neenmiksiĝo de la magistroj ne eblas kaj ke la konfrontado inter religio kaj scienco estas neevitebla, kiam la religioj preparolas la originon

de la homo, de la vivo, kaj de la universo. Kion vi respondas al ĉi tiu argumento?

H.K.: Ĉi tiu konfrontado estas neevitebla. Certe ekzistas multaj seriozaj kaŭzoj por kontraŭbatali la religion kaj ankoraŭ pli la misuzojn en ties nomo. Malmultaj teologoj pritraktis kiel mi, la negativajn facetojn de religio dum la lastaj jardekoj. Sed Dawkins ne citis mian libron *Ĉu dio ekzistas?*, daŭre furora libro, en kiu mi pritraktas preskaŭ ĉiujn demandojn levitajn de li. Anstataŭ enscenigi batalon unuflankan, supraĵan kaj malaltnivelan kontraŭ la religio, estus ĝenerale pli utile se la klarvidaj homoj batalus kune kontraŭ perforto kaj milito, subpremo de minoritatoj kaj virinoj pro religia kaŭzo, kaj kontraŭ la uzo de supers-tiĉo.

Tion dirinte, mi devas substreki, ke sistemoj totalismaj kaj ateismaj ankaŭ krimis kontraŭ humaneco, kaj oni devas sin demandi, kian rolon ludis la scienco en ĉi tiuj krimoj. Same kiel la religio, ankaŭ la scienco perdis sian senkulpecon.

Richard Dawkins skribis ke la scienco ne povas pruvi la neekziston de dio. Sed li asertas, ke ĝi povas demonstri ke lia ekzisto estas tre malprobabla. Ĉu liaj klopodoj estas legitimaj?

H.K.: Dawkins ne serioze studis kio estas religio, nek faris la kritikon de la religio. La argumentoj de Feuerbach, Marx, Nietzsche, kaj Freud estas senlime pli seriozaj ol liaj. En iu senco, Dawkins refalas en la 19an jarcenton. Li tute ne prikonsideras la nuntempajn ekzegezajn esplorojn, kaj literaturan kritikon de la biblio. Li legas ĝin laŭ sia naiva maniero.

La teorio pri la evoluo de Darwin hodiaŭ klarigas la originon de la

homo. Sed por vi kaj por multaj aliaj kredantoj kaj teologoj, tio ne pridubigas la ekziston de dio. Ĉu vi povas klarigi kial?

H.K.: Ĉiu inteligenta homo scias, ke la scienca teorio ne povas klarigi demandojn situantajn ekster la homa eksperimentado. Filozofoj Kant tre bone diris, ke la racio ne kompetentas pri la pritraktado de asertoj ekster spaco kaj tempo. Neniu ĝis nun klarigis la kaŭzon de praeksplozo. Teologoj kaj sciencistoj devas resti modestaj.

Multaj personoj estas aŭ fariĝis ateistoj pro la problemoj de malbono kaj suferoj en la mondo. Ĉu tio ne sufiĉas por forjeti la ekziston de dio bona, tutpotenca kaj bonfara?

H.K.: La 3a ĉapitro de la genezo tre bone montras, ke tio ne estas origino de malbono. Sed ekde la momento kiam homo disponas pri libera volo, li havas la eblon fari malbonaĵojn. Longtempe oni povus spekulativigi por scii ĉu libero eblas sen malbono. Sed la malbono estas fakto, kiu rezistas al ekspliko de la racio. Oni devas allasi ke religio ne kapablas klarigi kial okazis Holokaŭsto, sed estas tro facile turni sin al ĉielo kaj krii: de kie venis malbono?

Oni nur povas konstati, ke la homo povis fari tion, kaj insisti pri la respondecoj individuaj kaj kolektivaj.

Rimarko

Mi stumpletis ĝuste ĉe tiu «skribu, ke ne estas religio» (en la angla traduko: «Write there is no religion»). Kontrolante ĉe amikino kiu estas denaska parolanto de la malajala, mi trovis, ke por la deklaro, «mi ne havas religion» oni tute normale povas diri, «ne estas religio».

Same kiel en multaj aliaj lingvoj, ĉu ne? — «Ĉu vi havas terpomojn?» «Ne estas terpomoj.»

Giridhar RAO

Senreligia Ĝivan

Jen la mallonga leciono (por klaso por 7- 12-jaruloj) pri kiu furore polemikas unuflanke la kerala registaro, kaj aliflanke aro da religiaj eklezioj.

La angligo (kiu estas mia fontoteksto) de la malajala originalo aperis en la tagjurnalo *The Hindu* (la 26^{an} de junio 2008).

Sidigante la gepatrojn, kiuj venis kun sia infano, en la seĝoj fronte al si, la lernejestro ekplenigis la enskribilan formularon.

‘Knabo, kiu estas via nomo?’

‘Ĝivan.’

‘Bone, bela nomo. La nomo de la patro?’

‘Anvar Raŝid.’

‘La nomo de la patrino?’

‘Lakŝmi Devi.’

La estro levis sian kapon, rigardis al la gepatroj, kaj demandis:

‘Kiun religion ni menciuj?’

‘Neniun. Skribu, ke ne estas religio.’

‘Kaston?’

‘Same.’

La lernejestro klinis sin malantaŭen en la seĝo kaj demandis iom serioze:

‘Kaj se li sentos la bezonon por religio kiam li kreskos?’

‘Li elektu sian religion kiam li sentos la bezonon.’

Rimarko:

En la privata kunsido de ATEO dum la UK en Roterdamo partoprenis dek tri homoj. El tiuj dek tri, du nomi ĝis Jesus kaj du Christian. Ĉu temas pri nura hazardo?

Anna Löwenstein

La iluzio pri Dio

La libro jam aperis en 31 lingvoj. Sed ankoraŭ ne en la nia!

Recenzo de Joe Kay sur la retpaĝo de internacia komitato de kvara internacio elangligita la 15an de marto 2007:

La nova libro de Dawkins estas lucida. Neatendite fama sciencisto biologo mondkonata, esprimas sin por ateismo.

La libro «La iluzio pri dio» estas tiom salutata kaj plej vendata eĉ en Usono kies loĝantaro estas konsiderata kiel unu el la plej religiema. Ĝi troveblis en la listo de plej bonaj nefikciaj verkoj en gazeto «New York Times». La turneo de Dawkins tra Usono plej sukcesis, eĉ en la plej fundamentisma ŝtato Kansas. La sukceso ŝuldiĝas al la eksterordinara kapablo de la aŭtoro, klarigi tre kompleksajn aferojn, ekz. la tezon pri geno de egoismo, kiu estas tezo kompreneble kontestata.

Li trafas per sia libro la soifon de publiko al alternativo, ŝajne li respondas al ŝtonaj antaŭjuĝoj. Li trafas la kernon de subgrunda opozicio, kiu rifuzas bigotecon, kaj fundamentismon, ecaron kiu karakterizas nun la registarojn de Britio, Usono, k.a. regnoj.

KONTRAŬ TRANKVILIGA RILATO al RELIGIOJ

Dawkins traktas la temon foje erare, tion ni prezentos poste pli detale. Tamen, tre pozitiva estas lia klopodo, batali kontraŭ la ortodoksismo en ĉiaj ĝiaj formoj.

Sed li ankaŭ kontraŭstaras tiajn sciencistojn, kiuj pretendas harmoniigon de scienco kun religio.

Ŝerce li nomis tiujn scienculojn «Chamberlaina skolo por evoluciistoj» (laŭ la fama «pacpolitikisto» Chamberlain kiu kontraktis kun diktatoro Hitler en la jaro 1938a).

Tiaj skolanoj provas defendi la sciencon tiamaniere: Ni serĉu kompromison inter moderaj religiistoj — ne ekzistu konflikto inter religio kaj scienco — ili ja komplementas unu la alian! Aŭ ili laboru sur apartaj terenoj.

La forpasinta biologo de evolucio, Stephen J. Gould estis reprezentanto de tia opinio. Li asertis ke religio kaj scienco priskribas du diversajn kampojn. Li uzis tiacele metaforon. La scienco studas la movon de ĉielo, —sed religio kiel homo povus atingi ĝin —komentis Dawkins: «Kia bela alloga poeziaĵo! sed nur, se vi ne pripensas la aferon!»

La ĉefa tezo de Dawkins: la ekzisto de iu kreiva superulo inteligenta, estas demando por sciencistoj, kvankam ankoraŭ ne respondebla.

Analoge estu traktataj la vereco aŭ falseco de mirakloj, rakontoj tiom gravaj por ĉiaj kredoj. Ili ja nur utilas por impresi la adeptojn. Alidirite. se ekzistus dio, se tiu estus pli ol koncepto nebula, tiam ekzistus manifestaciigoj sur nia tero. Tion ja multaj homoj kredas! Ili opinias, ke dio intervenas, aŭskultas preĝojn ktp...

Dawkins citas eksperimenton : mal-sanulo ne resaniĝis pli rapide se iu preĝis por tiu. Nu, konsentite, tiu eksperimento ne estis tre saĝa (ĝin faris religiemuloj) sed ĝi ja klarigas ion gravan: se ekzistus fenomenoj religiaj, tiam ili estu science pruveblaj!

Kvankam tiu konstato gravas, tamen io mankas en la priskribo de Dawkins. Li klarigis la «hipotezon» pri dio kvazaŭ ekzemplon supozatan, «ĉirkaŭ la planedo Marso orbitas tepoto». Li citis la faman eldiron de Bertrand Russel. Eĉ ne sciinte ke ekzistas tia pota, neniu devigas min ne agnoski ĝin. Lia sinteno por sia ateismo konkludas ke dio plej probable ne ekzistas, same kiel ne probablas la orbito de tepoto ĉirkaŭ Marso. Dawkins same argumentas: plej superas la pruvoj kontraŭ la ekzisto de dio, sed tia ĉi ateismo «de 99%», evidente malfermas la pordon al plena skeptikismo.

La hipotezo pri dio reale estas io alia, ol rakonto pri tepoto. Eĉ ĝi ne estas hipotezo, ĉar ĝi asertas, ke la procezo de scienca ekkono, inkluzive la pruvojn de hipotezoj ne kondukas al vero, aŭ ne al plena vero. Religio postulas la kredon, ke io vera ekzistas, ekster la ekkonebla scio. Tial estas por religiemulo tute malgrava ia scienca pruvo. Ankaŭ la demando: «Kiaj estas viaj sciencaj motivoj ne kredi la sciencon?» evidente kondukas al nenio.

La konflikto inter religio kaj scienco pli profundas ol supozas la empiriisto Dawkins. La bazo de ateisma sinteno ne estas la neprobableco de dia ekzisto. (kvankam tiu hipotezo laŭ scienca vidpunkto estas la plej malverŝajna). Sed la ateismo estas mondkoncepto materiisma, filozofio kiu premisas ĉion materian kiu ekzistas.

Ĝi evoluas laŭ leĝoj de naturo alprenante diversajn formojn. Ĉar materio disvolviĝas laŭ difinitaj dependaj leĝoj, ĝi estas eslorebla. Tio estas la kerno de

konflikto inter religio kaj scienco, inter raciismo kaj obskurantismo.

La pravo de mondkoncepto materiisma videblas en la monda historio, la sperto de homaro en la naturaj kondiĉoj. Tial praktiko estas pravigilo por materiismo. Ne nur estas formulitaj hipotezoj sed ja la realaĵoj ŝanĝiĝis.

La parolantoj pri kunekzisto de evoluteorio kaj religio (tre konata estas E.Scott, direktoro de la nacia centro por scienca edukado), defendas la tezon de kongruenco inter scienco kaj religio. Ili distingas inter la nocioj: metodologia naturismo kaj metafizika naturismo. Tiuj supozigas ke eksperimentoj ekster la materia mondo neniel povas ekzisti. Sed ja estas klare ke neniel povas ekzisti kaŭzo kaj efiko ekster la materia mondo.

Tial tiaj scienculoj klopodante defendi la sciencon edukadon tamen subfosas la fundamenton de scienco, ĉar ili disrompas la ligan inter scienca esploro kaj realaĵo. Ili deklaras: eble ekzistas dio aŭ iu ajn supera estaĵo, sed scienco ne povas kompreni la veron.

Kapablas sciencistoj ĝuste taksu la mondon de materio kaj ŝanĝi ĝin. Tio ĉi ja pruvas, ke ne nur la metodo utilas, sed rimedo taŭgas por vere kompreni la mondon. Severa sistemo de observado, racia konkludo, hipotezo kaj eksperimento kondukas al pli da proksimiĝo al vero, por ekkono de nia universo. Ĝi estas sistema rimedo por pruvi la pravecon de niaj konceptoj. Per racio estas distingbla scienco kaj diversaj religioj sub formo de «supernaturo» kaj de ĉiaspecaj superstiĉoj.

KREDO JE RELIGIO - KAJ HISTORIO DE HOMARA SOCIO

Dawkins serioze traktas neniun el la problemoj de filozofio. Pro lia supraĵa maniero, li ne konvinkas, kvankam li prave defendas la ateismon. Li dediĉas grandan parton de sia libro al la sen-nombraj provoj kredigi la ekziston de dio (ekz. la «argumentoj» de kosmologio, de inteligenta celo). Dawkins ne kontribuas per novaj argumentoj. La plej multaj el tiaj supozataj pruvoj de dia ekzisto (kaj la konstato ke ĉiu efiko fontas el ia kaŭzo, kondukas al la unua efiko sen kaŭzo, nome dio). Tiaj «pruvoj» tute ne konvinkas nekredantojn, kaj la senmaskigo de falsaj pruvoj ne konvinkas dikredantojn. Dawkins emfazas pri la argumento por celo inteligenta, ke jam evoluciisto Darwin donis respondon per sia teorio de evoluo en naturo. Li klarigas, kiel kompleksaj organismoj transformiĝas post longa daŭro per procezo de selektado. La diskuto pri origino kaj tradicio de kredo religia, postulas pli da superrigardo de argumentoj por la supozo de dia ekzisto.

Sciencisto esploru ankaŭ kial ekestis variantoj de kredoj, kial ili sukcesis transvivi tiom longe? Tion Dawkins ne kapablas klarigi, li ekstumbas je tia defio, ĉar li ne esploras la sociajn rilatojn, faktorojn kiuj favoras la disvastigon de religioj. Por kompreni la fenomenon, religio necesas materiisma scienca aliro: La religio estas entute la produkto de ajna socio. Kulturo kaj religio estas fenomenoj sociaj, kaj ne individuaj. Dum sia vivo homo estas influata tiel aŭ aliel per ideologio de sia ĉirkaŭaĵo. Tial, la materiisma klarigo devas bazi sin je materiisma ekkono de homa socio. Kiel multaj aliaj sciencistoj, Dawkins ne

esploras la historion kaj kulturojn per tia materiisma principo. Tial li finfine eskapas al klarigoj idealismaj.

La historia materiismo tia estas la marksismo. Ĝi klarigas la ideologiojn, i.a. la religiojn, el la vidpunkto de la produktada organizo, kun ĉiaj sociaj implikoj.

Tiel skribis Karl Marx en la enkonduko al «kritiko de politika ekonomio». La formo de produktado de nia materia vivo, konsistigas plene la socian politikan, kaj spiritan vivprocezon. Ne la konscio determinas al la homo ties estadon, sed male, la estado en socio determinas la homon.

En diversaj epokoj la religio utilis kiel ideologio por pravigi la regantajn klasojn, por eternigi la ekzistantan sociordon. Ekz. en mezepoka Eŭropo la katolika eklezio estis piliero de feŭdismo, kaj cetere posedis plej multe da tereno. Komplice kun religio la regantaj klasoj kontrolis la produktadon kaj la popolon laborantan. Por pravigi la hierarkion la eklezio ofertis la suferĉeson en paradizo. La efiko de religio similas al «opio». Ĝi donas al povruloj kaj subuloj, esperon por pli agrabla postmorta vivo. Pro tia alloga perspektivo la religia ideologio tre prosperis.

Karl Marx skribis en sia libro «Kritiko al jura filozofio de Hegel», ke religio estas la ĝemado de minacata homo, el animo kreita de la senkora mondo. Same ĝi estas spirito de cirkonstancoj malspiritaj. Ĝi estas «opio de popolo».

Certe estas tre kompleksa la historio de religioj. Ĝi alprenis memstaran vivon, sekvas propran logikon. Ĝi disvolviĝas laŭ propraj reguloj.

Homoj pli kaj pli komprenas la mondon pro la edukado je scienca nivelo. Sed male, la koncepto pri dio tendencas abstrakton kaj neglektas la ĉiutagaĵon. Kvankam nerekte religio okupas terenojn de sperto, kiujn ankoraŭ ne penetris la sciencoj. Sed ĝenerale la progreso dependas de avangarda tekniko, kaj la religio postrestas.

Dawkins ne konsentas kun tia politika deklaro. Li diris: mi koncedas, ke sklavo, negroj, estis subpremataj. Ankaŭ estas interesa la demando kiel religio rolis.

Sed por Darwinistoj estas pli interese scii kial homoj inklinas al ĉarmo de religio, kial ili efektive estis ekspluatataj de cinika pastraro, politikistoj, reĝoj.

Nu certe tiu argumento gravas, kial homoj plej volonte akceptas religion? (ĉu pro biologia inklino?), kvankam ankaŭ socia progreso influis ilin!

Kial aliaj ideologioj ne povis anstataŭi religion? Kial estas aparte alloga kaj sukcesa la religio? Ne nepre estas avantaĝa en la evolucia procezo la religio. Eble ĝi nur estas kromefiko por la transvivo de homaro, eble ĝi ne gravas.

Dawkins kredigas al ni, ke ni evoluis respektante la dirojn de niaj antaŭuloj. Ilia konduto estis utila ĉar ni ja profitu el la kolektitaj spertoj! Nu, tio ja povas esti, sed kial ĝuste religio kaj nenio alia heredigis?

Pli akceptebla estas la teorio de Daniel Dennet: religio estas intenco imputa. Homo evoluas interpretante la nekomprenatan aganton. Tio utilas por taksi la konduton de bestoj aŭ kunhomoj. Religio estas supozo de alkonforma aganto: dio pluvias, inundas, mortigas.

Ĉiuj tiaj diversaj tezoj estas tre interesaj sed ne tre akcepteblaj, ĉar ne pruveblaj. Ĝis nun Dennet kaj Dawkins nur frazis el sur ebura turo. Kiam ili supozigas, ke naturo agas celkonscie, ke infanoj kredus ĉion kion diris la gepatroj, tiam ni ne povas klarigi, kial ankoraŭ nuntempe niaj idoj estas cerbolavitaj. Same per tiaj teorioj ne klarigeblas la evoluo de religioj en siaj specifaj formoj. Por respondi, la duopo Dawkins kaj Dennet uzas trukon, t.e. neologismon «memo». Tio signifas ion analogan al «geno» en biologio. Ĝi estas fantazia mezurunuo de «kultura heredaĵo». Kelkaj «memoj» estas pli potencaj ol aliaj. Jam forte kritikis tian tezon de Dennet - religio kiel «fenomeno natura» J.Brookfield.

Sufiĉas rebati tian tezon per la argumento, ke ideo ne kreas ideologion. Dawkins konfesis, ke li havas problemon klarigi la evoluon de la kulturo. Li skribas pri la spirito morala, kiu foje ŝanĝiĝas. Sed «tion respondi ne estas mia tasko».

Se ni nur atendus logikan teorion pravigon por la neekzisto de dio, aŭ starigi teorion pri la ekesto de religio, en pratempo, tiam tia deklaro estus akceptebla. Sed en vero Dawkins celas ion alian. Li intencas ŝanceli la aktualan socian kaj politikan interkonsenton. Bedaŭrinde mankas al li la necesa fundamento, por klarigi, kial ankoraŭ ekzistas religio. Tia pretendo nur kondukis lin al reakciaj deklaroj kaj konkludoj.

RELIGIO KAJ POLITIKO

La problemo, kiun alfrontas Dawkins kaj ankaŭ multaj aliaj, estas rifuzo de teorio marksista. Dawkins referencas ĝin nur marĝene, en la supre menciita alineo pri sklavo. Por Dawkins religio havas

nenian politikan aŭ socian dimension. Li traktas ĝin kiel puran ideon, sen rilato al la ordinaraĵ viv-cirkonstancoj. Li skribas ekz.: la afganaj talibanoj kaj usonaj talibanoj (t.e. la fundamentistoj en Usono) tre bone montras, kio povas okazi, se homoj kredas je sanktaj skriboj!

Certe religiaj libroj havas rolon, sed la afganoj kaj usonaj «talibanoj» estas produktoj de siaj respektivaj socioj. Ili ne estas senpere kompareblaj. Tia aliro al religio havas konsekvencojn. Komence de sia libro, Dawkins skribis pri la karikaturo pri Mohameto, publikigita en la danlanda ĵurnalo «Jyllana Posten». Tiu karikaturo provokis protestajn manifestaciojn tra la mondo. La «tutmonda» gazetaro kondamnis tiajn protestojn kiel atakon al libereco de opini-esprimo kaj defendis la bigotan karikaturon. Dawkins aprobis ĉion. Sed —eĉ se mi ne estas subtenanto de mohametismo,— estas klara la celo de provokado kaj instigo al etoso kontraŭ-islama.

Tial la protestoj kaj manifestacioj reagis kontraŭ Eŭropo kaj Usono. La fakto ke malkontento en proksima oriento kaj aliloke ofte havas karakteron religian, estas produkto de sociaj faktoroj el historio. La perspektivo de sekulara burĝa naciista movado (la Baath partioj) fiaskis. Stalinismo perfidis kaj la socialismon kaj la internaciismon. Usono kaj aliaj regnoj subfosinte tiajn movadojn, ĉar ili opiniis pli danĝera la ruĝan armeon en Afganio, ol la teroriston Osoma bin Laden.

Dawkins blindas kaj li esprimas sin ekstreme reakcie. Li konsentas kun Patrick Sookhdeo, direktoro de la instituto: «Studo pri islamo», kiu interpretis la memmortigajn atencojn de junuloj nur


per religia fanatika islamo. Tio ja vere ŝokas, ke Dawkins papage ripetas la vortojn de fia evangelia asocio.

Ankaŭ marksistoj celas redukti la influon de religioj en proksima oriento, en Usono, kaj ĉie tra la mondo. Religio estas malscienca, ĝi kaŝas la veran naturon de la socio, t.e. subpremado kaj ekspluatado. Tre ofte ĝi servas kiel peranto por la reakcio kaj la militismo. Por atingi la celon, necesas kompreni la faktojn, la fundamenton de kredo. Marx vortigis tian devizon: la abolo de religio kie feliĉo iluzias, estus la postulo forlasi la staton kie estas bezonataj la iluzioj. La kritiko al religio estas la ĝermo. La kritiko de mizerejo kie inundas larmoj, kies aŭreolo estas la religio. La kritiko de la ĉielo transformiĝos al kritiko de l'tero, la kritiko de religio al kritiko de juro, la kritiko de teologio al kritiko de politiko. Alimaniere esprimata: la batalo por scienco, materiisma mondkoncepto, tuthomara konscio, estu ligita kun la provo klarigi la veran naturon de socio kaj ties subpreman econ. Ĝi estu batalo politika por socialisma, monda movado!

*Elgermanigis la
recenzon D. Rooke.*



Granda aro da esperantistoj sekvis la diskuton ĉe nia publika kunveno.



Christian Rivière surprizas nin per sia traduko de ĉi tiu libro en Esperanto. Espereble en la venonta numero li regalos nin per recenzo pri ĝi.

La liberpenso adresas siajn plej korajn bondezirojn al Benito XVI

*Happy birthday, sinjor’
Vatikan’!*

Ne temas pri misparolo de Marilyn Monroe! La «Ŝtato» Vatikano ja atingis sian kanonan aĝon je 80 jaroj, la lastan 11^m de februaro. Ĝia *papa* (papo itallingve) nomiĝas Pie XI (pseŭdonomo heredita el kelkaj murdaj kruc-militoj), kaj ĝia panjo nomiĝas per la mildsona nomo Benito Mussolini, kromnomata «*la Duce*» inter du masakroj de kontraŭfaŝistoj.

Ni bedaŭras ke tia datreveno ne okazigis grandan feston aŭ, pli kulture, grandan internacian kolokvon pri la historio de Vatikano, kiun povus animi la honesta historiisto Msr-o Richard Williamson, freŝdate sursceniĝita ĉe amas-medioj pro originala analizo de la malapero (ni ne aŭdacas paroli pri genocido) de ses milionoj da judoj. Tio bele aspektus kaj certe pasiigus la amasojn.

En mallonga parolado, la Papo substreki ke «*La Ŝtato Vatikano entenas trezorojn da piemo, da historio, da arto, kaj konservas ĉies heredaĵon valoran por la tuta homaro*». Niaj traserĉoj, kvankam «*pedantaj*», trovis neniun spuron pri eĉa ratifikado de minimuma Deklaracio de Homaj Rajtoj, eĉ ne de obtuzvoĉa kondamno de iu ajn faŝista aŭ korporacia reĝimo. Ni cetere plu restas mirigitaj antaŭ lia prisilento, inda je Pio XII, pri ratifikado de ajna direktivo el la Internacia Buroo de l’ Laboro, fare de la «*Ŝtato*» Vatikano.

Benito XVI neniel elvokis, kaj tio kompreneblas, la «*anekdotojn*» de Vatikano, ankaŭ kiuj estas valoraj ĉies heredaĵoj en tiu senco ke ili provizas nin per netaksebla instruo pri la fieco, la malĉasteco, la krueleco, la avideco kaj la rabemo de multnombraj el liaj antaŭuloj.

La Papo adresis siajn dankojn al «*ĉiuj kiuj estintece kaj estantece korifeas la vivon de la Ŝtato de La Vatikana Civito*». Oni sentas emocion kaj amon, kio ja estas natura kiam oni scias ke la unua «*korifeo*» estis Benito Mussolini, subskribinto de la interkonsento de la Latran kun la reprezentantoj de la Papo Pie XI. Bela epoko!

Efektive, kiam oni juna, sur la placo Sankta Petro, laŭpaŝas la pavimitan linion kiu signas la «*landlimon*» de Vatikano, oni estas emociita kaj mirigita de tiu magia linio kiu irigas onin de iu mondo al alia. Kiam pli maljuna, al oni evidentiĝas la artefarita flanko de la afero, kaj oni pli volonte pensus pri romia Disneylando, ja bone konstruita.

Fakte, la onidirita «*Ŝtato*» Vatikano estas nur kreitaĵo de Mussolini. Cetere ne ekzistas vatikana civitaneco. Estus pli da funkciuloj dungitaj de Vatikano ol da «*vatikanaj civitanoj*». Tiu nocio «*vatikana civitaneco*» estis ĉefe uzata por ŝtelmigri naziojn el Eŭropo en 1945 per la reto «*ratslines*» (rat-savvojo).

Laŭ la lastaj «*tezoj de la liberalismo*», tio signifus ke Vatikano estas la lasta komunista Ŝtato! Efektive, laŭ tiu tezo, la nombro de funkciuloj, rilate al la nom-

bro de loĝantoj estas la esenca kriterio de la «*kolektivismo*». Krome, ĉio estas proprietaĵo de la ŝtato en Vatikano!

Tiu teokrata «*princlando*», estrata de absoluta ĉefo, sen politikaj partioj, sen liberaj sindikatoj, sen ajna (eĉ la plej elementa) speco de demokratio, i.a. balota, estis tamen konfirmita de la itala registaro, en 1984, per interkonsento kiu implicis kelkajn modifojn de la Konkordato de 1929. Cetere sur tiu ĉi lasta teksto sin apogas nun Silvio Berlusconi por sia klerika atako.

La Nacia federacio de la Liberpensu povus ĝoji pro tia datrevena memorigo nur se temus pri la lasta. Ĝi daŭrigas (sian batalon kontraŭ ĉiuj obskurantismoj, por la libereco de la mensoj, por la digneco de la Homaro.

Kun la Internacia Unio Humanisma kaj Laika (IHEU), ĝi daŭrigas sian aktivadon por totala kaj efektiva Disigo de ĉiuj klerikoj kaj de ĉiuj Ŝtatoj, kaj por malapero de la teokrataj «*Ŝtatoj*».

Parizon, la 2an de majo 2009a
Tradukis Dominique Simeone



Ateisma moralo

Kial agi morale, se oni ne kredas je Dio? Tio estas la demando, kiun ateistoj foje ricevas de religiuloj. Ĝi baziĝas en la supozo, ke se oni ne kredas je Dio, ne ekzistas reguloj pri konduto, kaj ke ĉio estas permesata: ke la homoj sentus sin liberaj murdi, ŝteli kaj perforti sen iuj ajn moralaj skrupuloj. Krome, laŭ tiu argumento, sen Dio oni ne havas gvidon pri moralaj demandoj – praktike, oni devas mem decidi, ĉu difinita konduto estas bona aŭ malbona.

Ni diskutis tiun temon dum la publika kunveno de ATEO dum la Universala Kongreso en Roterdamo. Jen mia mallonga enkonduko, kiun mi prezentis dum tiu kunveno. Ĝi estis inspirita de tri libroj:

Atheism: a very short introduction (Ateismo: tre mallonga enkonduko) de Julian Baggini.

God is not great (Dio ne estas granda) de Christopher Hitchens.

The God Delusion (La Frenezaĵo Dio) de Richard Dawkins.

Baggini estas filozofo, kaj li aliras la demandon laŭ filozofia vidpunkto. Li demandas, ĉu ago estas bona nur ĉar Dio ordonis, ke ni faru ĝin; aŭ ĉu Dio ordonas, ke ni faru difinitan agon, ĝuste ĉar ĝi estas bona? Se oni supozas la unuan, tio signifas, ke boneco estas arbitra normo; sed se ni supozas la duan, tio signifas, ke moraleco estas normo, kiu ekzistas aparte de Dio. Religiulo eventuale respondus, ke kompreneble Dio neniam postulus, ke oni faru malbonan agon. Sed tiu aserto en si mem montras, ke oni mezuras la

agojn kaj ordonojn de Dio laŭ iu ekstera normo.

Baggini atentigas, ke la homoj emas konfuziĝi inter moraleco kaj leĝoj. Kiam ili supozas, ke nur la ekzisto de Dio malhelpas la homojn fikonduti, ili vidas Dion ne nur kiel leĝodonanton, sed ankaŭ kiel juĝiston kaj policiston. Li komentas: «...tio estas stranga moraleco, kiu supozas, ke oni povas agi etike nur se oni faras tion pro timo pri puno aŭ pro promeso pri rekompenco.» Laŭ lia argumento, ateistoj fakte agas pli morale ol religiuloj, ĉar ili kondutas bone ankaŭ sen tiaj dubindaj motivoj.

Laŭ la Biblia rakonto, Abrahamo kredis, ke iu ajn ordono, kiu venas de Dio, nepre estas bona kaj ĝusta. Kiam Dio ordonis, ke li mortigu sian propran filon, Abrahamo efektive estis preta fari tion, tutsimple ĉar la ordono venis de Dio. Ankaŭ nuntempe ekzistas homoj, kiuj estas pretaj bombi kaj mortigi, nur ĉar iliaj religiaj gvidantoj asertas, ke tiuj agoj konformiĝas kun la volo de Dio. La plejmulto da homoj, ĉu ateistoj, ĉu religiuloj, tamen opinias, ke ĉiu mem respondecas pri la morala ĝusteco de siaj agoj; eĉ se teroristo sincere kredas, ke la ordono venis rekte de Dio, ni ne konsideras tion sufiĉa pravigo.

Se ni ateistoj ne kredas, ke nia moraleco fontas el Dia ordono, kiel ni do decidus, kio estas morala konduto? Baggini diskutas tiun demandon sufiĉe detale, kaj konkludas: «Mi proponas, ke temas pri baza zorgo pri la bonfarto de aliaj, zorgo kiu baziĝas ne en racia argumento sed en konsentado.» Ne necesas esti religiulo por senti la suferadon de aliaj homoj kaj por deziri ilian bonfarton.

En la libro *Dio ne estas granda* estas ĉapitro kun la titolo «Ĉu religio instigas la homojn konduki pli bone?» Hitchens respondas tiun demandon ne per defendo de ateismo sed per atako kontraŭ religioj. Li citas terurajn ekzemplojn de modernaj amasbuĉadoj, ekzemple en Ugando kaj Ruando, kiuj estis gvidataj kaj instigataj de religiuloj. Li memorigas, ke ankaŭ moderna sklavokomercio en Ameriko estis subtenata de kristanaj ŝtatoj kaj socioj, dum la islama mondo faris same en Mediteraneo kaj Nord-Afriko. La pardonpetoj de la lasta papo al diversaj grupoj mistraktitaj de la katolika eklezio dum pasintaj jarcentoj montras, ke eĉ la papo mem agnoskis, ke la eklezio ofte kondukis laŭ maniero malmorala kaj eĉ krima.

Hitchens komentas, ke la sovaĝa dio de la Malnova Testamento konstante instigas siajn sekvantojn al konduto, kiun ni modernuloj konsiderus absolute ne morala, ĉefe la detruado de najbaraj triboj. La unuaj aludoj al infero kaj eterna punado, aliflanke, troviĝas en la Nova Testamento. Laŭ Hitchens: «Nur kiam ekaperas la Princeso de Paco [t.e. Kristo], ni aŭdas la naŭzan ideon pri plua punado kaj torturado de mortintoj».

Richard Dawkins estas biologiisto, kaj lia libro aliras la diskuton pri moraleco parte laŭ biologia vidpunkto. Laŭ li tio, kion ni nomas «bona» konduto, estas konduto, kiu helpas aliajn homojn, eĉ kiam tio kontraŭas nian propran intereson. Laŭ li, tia malegoisma konduto

donis al la homoj avantaĝon sub la malfacilaj situacioj en kiuj la homa specio evoluis. Kiam la homoj vivis en malgrandaj grupoj, ilia komuna helpado kontribuis al la travivado de la tuta grupo. Cetere tio ne estas afero nur de la homa specio; ĝi ekzistas ankaŭ interspecie. Reciproka helpado donas aktivan avantaĝon ekzemple al floroj kaj abeloj, al koraloj kaj papagofiŝoj, kaj al multaj aliaj specioj, kiuj nepre bezonas unu la alian por sia komuna travivado.

Kiam oni helpas parencojn, oni helpas la travivadon de la propraj genoj. Tial, laŭ Dawkins, reciproka helpemo estis favorata en la fruaj homoj kaj estis transdonata en la genoj. Kvankam ni ne plu vivas en malgrandaj komunumoj konsistantaj plejparte el

parencoj, ni ankoraŭ sentas tiun instinktan deziron helpi aliajn homojn. Tial ni spertas kompaton, kiam la televido montras malsatantan infanon, eĉ se tiu infano loĝas ĉe la alia flanko de la terglobo kaj certe ne povas esti rekta parenco. Dawkins do konkludas, ke la deziro helpi aliajn homojn kaj protekti ilin kontraŭ suferado estas profunda instinkto, kiu aperis en la homoj eĉ antaŭ la ekesto de religioj. (Kompreneble, eĉ se tiu instinkto fontis en tute praktika biologia neceso, tio neniel malpliigas



ĝian valoron!)

En posta ĉapitro, Dawkins ekzamenas la aserton, ke niaj ideoj pri morala konduto fontas en la Biblio. Li demandas, precize kiel la Biblio transdonas al ni tiujn normojn. Supozeble, ĝi povus fari tion dumaniere: per rektaj instruaj (kiel ekzemple en la Dek Ordonoj) aŭ per ekzemplado. Kaj tamen, se oni atente legas la Malnovan Testamenton, multaj el la rakontoj ŝajnas proponi sufiĉe dubindajn modelojn de konduto. Ni konsideru ekzemple la rakonton pri Noa: tre ĉarma fabelo, sed kian modelon ĝi proponas al ni? Ĝi montras al ni dion, kiu estas preta dronigi ĉiujn, inkluzive de infanoj, krom unu familion.

La natura rebato de religiuloj al tiu kritiko estas, «Sed kompreneble, ni ne devas preni tian rakonton serioze; ĝi estas nur simbola.» Kiel ili decidas, kiuj rakontoj de la Biblio proponas veran moralan instruon, kaj kiuj havas nur simbolan valoron? Evidente ili juĝas laŭ la kriterio de iu morala normo – kaj evidente tiu morala normo ne troviĝas en la Biblio mem, sed ekster ĝi.

Same rilate al la rektaj instruaj, kiel tiuj, kiujn Dio donis al la izraelidoj en la Biblio. La plej elstara ekzemplo estas la Dek Ordonoj. Malmultaj homoj efektive provas sekvi tiujn ordonojn laŭlitere, aŭ eĉ entute opinias, ke ili estas sekvindaj. Kaj ekde la plej fruaj tempoj oni reinterpretis la Dek Ordonojn laŭ la propraj opinioj. La numero 6, ekzemple, tekstas “Ne mortigu”. Simple tiel, sen esceptoj aŭ kondiĉoj. Kaj tamen, estas evidente ke religiuloj dum la jarmiloj sentis sin liberaj reinterpreti tiun ordonon laŭ la moralaj normoj de la propra epoko.

Alivorte, iliaj moralaj opinioj ne venis el la Biblio, sed tute male: iliaj moralaj normoj estis aplikataj al la instruoj de la Biblio.

Dawkins montras, ke moralaj valoroj nature ŝanĝiĝas iom post iom dum la jarcentoj. Multaj sintenoj, kiuj estis sociaj normoj en Bibliaj tempoj, aŭ eĉ dum la 19^a jarcento, nun fariĝis neakcepteblaj. Sklaveco estas malpermesata preskaŭ ĉie; en la plejmulto da landoj virinoj ne plu estas taksataj malsuperaj al viroj; la homoj ĝenerale ne plu rajtas esprimi rasismajn opiniojn; kaj dum militoj oni almenaŭ provas (eĉ se ne tre sukcese) eviti mortigadon de civiluloj. Temas pri ŝanĝiĝoj en la publika sinteno relative lastatempaj; ili okazas iom post iom tra la tuta mondo, en iuj landoj kaj kulturoj pli frue, en aliaj malpli frue, kaj la plejmulto el ni verŝajne opinias, ke temas pri pliboniĝoj.

Dawkins nomas tiun fenomenon «la ŝanĝiĝanta morala *Zeitgeist* [spirito de la epoko]». Li komentas, ke ne eblas klarigi la kaŭzon de tiu fenomeno; sufiĉas diri, ke ĝi okazas, kaj ke ĝi movas la homaron ĝenerale al pli homecaj sintenoj. Li konkludas, ke tiu ŝanĝiĝanta spirito de la epoko, kiu certe portas nin en bona kaj dezirinda direkto, en si mem montras, ke oni ne bezonas Dion por kondukti morale, aŭ por decidi, kia estas morala konduto.

Anna Löwenstein, Italujo

Noto pri la tri libroj menciitaj en la artikolo: Bedaŭrinde ili ne ekzistas en Esperanta traduko, sed almenaŭ la lastaj du certe ekzistas en multaj nacilingvaj tradukoj. La unua estas sufiĉe mallonga, kaj eble la plej bona kandidato por tradukado en Esperanton.

Universalkongresaj demandoj ĉe UK 93-a

1. Ĉu plaĉis al vi la kunveno dum la kongreso? Kiujn temojn vi volus diskuti dum estontaj kunvenoj de ATEO?

Ne multe, ĉar mi malkovris, ke sin difinas ateistoj ankaŭ homoj, kiuj kredas je «eksterteruloj», «paralelaj mondoj», kaj aliaj nepruvitaj hipotezoj.

Diskutindaj temoj: «Kio estas ateismo?» kaj konsekvence «Kio estas ATEO?»

Nino Vessella / Italia

Plaĉis nur parte la kunveno. La iniciato estis bona, la temo interesa. Sed dum la kunveno mia interesiĝo malaperis pro ĉeestantoj kiuj parolis eksterteme. Tio povis okazi ĉar la gvido de la kunveno estis malforta. Tial mi foriris antaŭ la fino.

Eble estontaj temoj:

Pace vivi, kunvivi kun aliaj vivkondiĉoj,

Ĉu interreligia dialogo / komunikado povas reale kontribui al paca kunvivado aŭ ĉu io alia necesas?

La slogano de la nederlanda Humanisma Ligo estas «Mem pensi, kune vivi». Kiel realigi ĝin?

La diferencoj inter permesemo, toleremo, akceptemo kaj respekto. Kie estas la limo?

Humanistoj konas ateistojn, agnoskantojn kaj liberajn liberpensulojn. Ĉu kunlaboro inter ili eblas? Komuna estas ilia maldogmismo.

*Kees Ruij / Malden,
Nederlanda*

Jes, mi partoprenis la kunvenon pri ateismo. Tio interesis min, ĉar mi estis en lernejo edukita esti ateisto. Mia lando estas Serbujo, kaj antaŭa Jugoslavujo.

Vi demandis min ĉu la kunveno plaĉis al mi. La temo estis interesa, bone prezidis virino kaj prezentis la temon kaj legis pri ĝi, sed poste la partoprenantoj ne havis enhavajn komentojn. Pro tio mi jam tiam bedaŭris. Ni havis ankaŭ malmulte da tempo.

Kaj la dua demando estis «kiujn temojn mi volus diskuti dum estontaj kunvenoj de ATEO?»

Mia propono estus: «KIUJ ESTAS LA MALLUMAJ FLANKOJ DE KREDO?»

*Svetlana Milanovic /
Jisselmuiden, Nederlando*

Plaĉis al mi la kunveno de ATEO en la lasta UK. Oni sentis ke la partoprenantoj estis interesataj. Eble, oni povus trakti la venontan temon: «Kial vivigi asocion pri ateismo?»

*Martine Rivière / Nantes,
Francio*

Jes! La diskuto estis tre interesa, tre vigla, sed pro ĉambra sono kaj sonorizado, foje parolantoj estis malfacile kompreneblaj. Aparte tio okazis kiam iu ĝuste antaŭ la estrado parolis; li parolis al iu alia ĉe la estrado sed malantaŭ li, tiam oni ne komprenis lin.

Alia rimarko: en la malfermita ATEO kunveno, dimanĉon, ĉeestis ĉirkaŭ 50 personoj. En la fermita kunveno, mardon, ĉeestis nur 7 personoj. Tio sugestas ke multaj personoj interesiĝas al ateismaj aferoj, sed ili ne interesiĝas al ATEO. Kion konkludi de tio?

*George Lhuissier / Tours,
Francio*

2. Kiel ateistoj ni ne havas supernaturan figuron aŭ sanktan libron, nek eĉ pastrojn, por informi nin, kio estas bona konduto kaj kio estas malbona. Kaj tamen ni ateistoj ne malpli ol religiuloj havas niajn normojn pri morala konduto. Kion por vi signifas morala konduto?

Unue ni estas homoj. Ni havas senton por plori, por esti feliĉa, por doloro, por disigi bonecon de malboneco kaj tiu natura donaco kiun posedas homo estas sufiĉa por scii morale kondukti. Kion por mi signifas morala konduto? Scii kondukti laŭ ne-skribitaj reguloj, sed kiujn oni subkomprenas. Se oni ekzemple ŝtelas oni iras en malliberejon. Polico punos onin. Tion ĉiuj homoj scias, ĉu kredantoj ĉu ne-kredantoj. Laŭ tiuj normoj aŭ niaj propraj moralaj sentoj ni kondukas.

Tio estas mia penso pri via demando.

*Svetlana Milanovic /
Ijsselmuiden, Nederlando*

Kiel ateistoj ni ne havas supernaturan figuron aŭ sanktan libron, nek eĉ pastrojn, por informi nin, kio estas bona konduta kaj kio estas malbona. Kaj tamen ni ateistoj ne malpli ol religiuloj havas niajn normojn pri morala konduto.

Kion por vi signifas morala konduto?

La komunumo en kiu oni vivas devus ĝin difini kiel eble plej demokrate.

Nino Vessella / Italia

Mi estis edukita laŭ unu vivmotivo: Konduki al ĉiu tiel, kiel vi deziras ke ĉiu konduki al vi. Per tiu argumento miaj gepatroj akompanis nin, kaj ankaŭ ni, infanoj, uzis ĝin inter ni.

Tio implicas, ke ni ne ŝtelu, ne mortigu, ne mensogu k.t.p. Ke ni kultivu virtojn, kiel toleremon kaj paciencon, ordemon k.t.p. kaj regu kiel eble plej niajn malvirtojn, kiel agresemon, havemon, envion kaj pigremon k.t.p.

Bona konduto kaj ago havas nur moralan valoron, se ni elkore volas konduki kaj agi tiel. Pro memestimo, por ke ni ne hontu antaŭ ni mem, ni ne povas agi alie. Estas la vivmotivo de la sendependa homo. Bona konduto kaj ago pro profito aŭ timo havas eble sian socian valoron, sed nepre ne moralan. Estas la vivmotivo de la sklavo. Sed, kiu staras, atentu, ke tiu ne stumblu.

Orgojlo estas malvirto, kiu minacas ankaŭ nin.

*Sophia Mensen / Middelburg,
Nederlando*

Memkonscio, memrego: libereco de la ateistoj

La religian moralon simbolas dek ordonoj sub formo de malpermesoj, venintaj de mi ne scias kie, sed redaktitaj de homo kiu arogis al si la rajton dikti al la aliaj sian manieron pensi, fabelante ke io supera antaŭ-konceptis la regularon. Tiulo samokaze negis tion kio ĝuste diferencigas la homon de la aliaj estaĵoj: ĝia memkonscio, ĝia memrego, ĝia kapablo decidi, analizi situacion, respondi siajn agojn. Sed tiu homa kapablo supozigas

minimuman nivelon de edukiteco. Tiam intervenas alia karakterizo de nia specio: ĝia kapablo organiziĝi, alsociiĝi, kaj tiel la socio ricevas la taskon certigi ĉiesan averaĝan edukitecon. Tiel la defio vivi estas kaj individua kaj kolektiva, ĉar la procezo memdecidi situas ĉe ambaŭ niveloj. Evidente la rezulto ne estas ĉiam brila, ĉar laŭdifine defio estas celo ne ankoraŭ atingita, kaj supozeble neatingebla. Ĉar nia mondo ne estas perfekta, tial ni povas konjekti pri neekzisto de dioj. La ekzisto de dioj negus la nocion mem de homa kaj socia defioj, do de memdecido, kio estas plej senesperiga. Vivi en mondo entute antaŭplanita estus neniel interesa.

*Christian Rivière / Nantes,
Francio*

Morala konduto estas pripensita konduto kiu referenciĝas al klasikaj kaj civitaj principoj de vivo en socio, sen rilato al iu ajn religio. «Ne ŝtelu», unu el la ordonoj de la kristana religio estas ĝenerala principo kiu koncernas kaj la religiulojn kaj la ne-religiulojn. Kaj fakte, oni konstatas ke ne estas pli da ŝtelistoj inter la unuaj ol inter la duaj.

*Martine Rivière / Nantes,
Francio*

Por klarigi tion mi demandas: «Moralo de kio originas?»

Iuj diras de supernaturuloj aŭ de sankta libro. Kiuj verkis sanktajn librojn? Sed kiel superuloj (aŭ tiuj kiuj pretendas paroli nome de ili) starigis tiujn regulojn kaj kondutojn?

Homoj estas gregaj estaĵoj kaj vivas grupe (en triboj ekzemple). Tio necesigas regulojn por ebligi tiun vivmanieron. Poste neeviteble venas konfliktoj inter anoj de la grupo. Ankaŭ por solvi ilin necesas reguloj. Se ne, iamaniere la grupo malaperos. Oni povas preskaŭ esti certa ke tiuj personoj kiuj parolis nome de superuloj, aŭ verkis sanktan libron, vivis en tia grupo. Ili observis tiujn aferojn, kaj kiel membroj de la grupo rilatis inter ili. Ili deduktis tion kio estas bona por ke la grupo vivu pace, konkorde.

Eĉ se iu homo estus sola (sur iu senhoma insulo aŭ en loko sen homo kaj tre tre malproksima de iu alia homo), tiu devus

respekti regulojn: trovi manĝaĵojn, trinki, eviti bestojn, ne detrui kion li manĝas ktp... Tiu regularo estas preskaŭ iu moralo, natura moralo.

Por mi, origino kaj neceso de la moralo estas la grupa vivo kaj... ankaŭ la naturo .

*Georgo Lhuissier / Tours,
Francio.*

3. La dek ordonoj:

1. *Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi.*
2. *Ne faru al vi idolon, nek bildon de io, kio estas en la ĉielo supre aŭ sur la tero malsupre aŭ en la akvo sub la tero.*
3. *Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo, via Dio.*
4. *Memoru pri la tago sabata, ke vi tenu ĝin sankta.*
5. *Respektu vian patron kaj vian patrinon.*
6. *Ne mortigu.*
7. *Ne adultu.*
8. *Ne ŝtelu.*
9. *Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston.*
10. *Ne deziru la domon de via proksimulo; ne deziru la edzinon de via proksimulo, nek lian sklavon, nek lian sklavinon, nek lian bovon, nek lian azenon, nek ion, kio apartenas al via proksimulo.*

Kiuj el tiuj dek ordonoj laŭ vi ankoraŭ validas (eventuale kun modifoj aŭ kondiĉoj)? Kiuj tute ne plu validas?

Se temas pri la dek ordonoj, mi savus la jenajn:

1. Respektu vian patron kaj vian patrinon kaj reciproke respektu viajn gefilojn.
2. Ne mortigu.

3. Ne adultu.

4. Ne ŝtelu.

5. Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston.

6. Ne deziru la domon de via proksimulo; ne deziru la edzinon de via proksimulo, nek lian sklavon, nek lian sklavinon, nek lian bovon, nek lian azenon, nek ion, kio apartenas al via proksimulo.

La unuaj evidente apartenas al la mondo de la tradicia religio kun superdio, kiun oni devis trakti kiel oni traktis regon. Mi aldonis la respekton fare de la gepatroj al la gefiloj, kio ankaŭ estas io konsiderinda en la nuna mondo.

*Renato Corsetti / Palestrina,
Italia*

Dankon! Vi estas la unua. (Almenaŭ la unua, kiu sendis ankaŭ al mi!)

Kaj tamen, se vi aldonas al tiu pri gepatroj la fakton, ke oni ankaŭ respektu la gefilojn, ĉu vi ne devus aldoni al tiu pri dezirado de la edzino de la najbaro la fakton, ke oni ne rajtas deziri ankaŭ ties edzon?

*Anna Löwenstein / Palestrina,
Italia*

Por mi ne validas: 1, 2, 3. Modifite validas: 4 (feriu almenaŭ unu tagon ĉiusemajne), 5 (respektu vian kunhomon), 7 (ne trompu kiel ajn), 10 (retenu ĵaluzon). Validas 6, 8, 9, sed pli vaste: 6... kaj ne perfortu, 8... kaj ne rabu

*Kees Ruij / Malden,
Nederlando*

1. Ne mortigu.

2. Ne ŝtelu.

3. Ne adultu (?)
 4. Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston.
- Nino Vessella / Italio*
5. Respektu vian patron kaj vian patrinon.
 6. Ne mortigu.
 7. Ne adultu.
 8. Ne ŝtelu.
 9. Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston.
 10. Ne deziru la domon de via proksimulo; ne deziru la edzinon de via proksimulo, nek lian sklavon, nek lian sklavinton, nek lian bovon, nek lian azenon, nek ion, kio apartenas al via proksimulo. (sed la sklavon sklavinton?)

*Georgo Lhuissier / Tours,
Francio*

4. La novaj dek ordonoj:

Se vi verkus mem novajn dek ordonojn (aŭ du, aŭ kvar, aŭ dek ses...), kio estus ilia enhavo?

Agu al via proksimulo same kiel vi volus ke li agu al vi.

Nino Vessella / Italio

Tamen eble eĉ nur ses ordonoj estas tro multaj. Mi kredas, ke ĉio estus resumebla per nur unu ordono. Tiu ordono estu tiu de Hilelo (Hillel), la rabeno kaj klerulo amata de Zamenhof:

«Tio, kion vi ne ŝatas por vi, ne faru al la aliaj homoj!»

Laŭ la legendo Hilelo aldonis: «Ĉi tio estas la tuta (religia) leĝo, la resto estas nur komentoj!» Temis pri demando de

pagano, kiu demandis lin pri la esenco de judismo antaŭ ol eventuala konvertiĝo.

*Renato Corsetti / Palestrina,
Italio*

Se mi verkus novajn ordonojn, mi validus nur unu: «Ne faru al la aliaj kion vi ne volus ke ili faru al vi». Dum la kunveno de la kongreso, oni esprimis tiun ideon formulante ĝin inverse: «Faru al la aliaj kion vi volus ke ili faru al vi». Parenteze, mi unue pensis ke estas same, kvankam la pozitiva parolo ĉiam pli efikas ol la negativa. Kaj poste, mi ekkonsciis ke mia katolika edukado probable ankoraŭ influas min. Kiel scii?

Nu, tiu ordono («Ne faru al la aliaj...») povas aperi simpla, tro simpla por homoj komplikaj aŭ malsanaj. Tamen, mi certas ke ĝi povas faciligi la socian vivon ĝenerale kaj plibonigi ĝin por la plimulto.

*Martine Rivière / Nantes,
Francio*

Mi konas nur unu moralregulon: Ĉio estas permesita, se farita plename. Aŭ pli konkrete: Ĉio estas permesita, se farita kun plena kaj libera permeso / kunlaboro de la alia(j) koncernato(j) kaj sen malutili al aliulo aŭ al ies posedaĵo.

*Kees Ruij / Malden,
Nederlando*

Nur unu ordonon mi verkus:

«Al aliulo ne faru kion vi ne volas ke oni faru al vi»

Ĝi anstataŭas ĉiujn aliajn.

*Georgo Lhuissier / Tours,
Francio*

Rilate al iuj vic-ordonoj kiuj povus enhavi nereligian moralon, mi volonte

anoncus ununuran: «Decidu mem plenkonscie kaj plenresponse», t.e.:

- . Kritikeme profitu de alies sperto. Konstruu vian propran sperton.
- . Al proponoj, novaj leĝoj, reguloj kaj trudoj sisteme demandu «Kial?», por ne akcepti ion ajn senpripense.
- . Neniam diru «Kial ne?», ĉar ĝi estas la demando de la kredantoj, kiuj ŝafe obeas, neniam kontestas.

*Christian Rivière / Nantes,
Francio*

Universala moralo sen bazo en religio

Vasta miskoncepto estas, ke oni ŝuldas respekton pri ies kulturo aŭ pli speciale pri ies religio. Kial? Religio kaj kulturo staras sur la sama nivelo, kiel politika konvinko aŭ scienca vidpunkto. Meritas respekton la individua homa personeco, sed neniam la konceptoj, kiujn dorlotas tiuj homoj. Tiuj opinioj povas (kaj rajtas) esti provizitaj de kritika komento. Kiu ne volas esti kritikata pri tio plej intima, sankta kion li posedas, tiu ne metu ĝin en socian diskuton. Sed tuj kiam li preferas meti sian religion en la publikan kampon, ĉu per religia motivado de rezonado, ĉu per la surhavo de religia vestaĵo, aŭ kolportado de sia religio alimaniere, tiam libervole malfermiĝas al kritiko. Tio do validas ankaŭ pri la eldiro, ke moralo originas en religio, speciale en sanktaj libroj. Do necesas, ke religioj aŭ religiaj tradicioj povu esti libere esplortaj kaj eventuale kritikataj. Krome por tiu kritiko estas necese, ke oni povas meti kontraŭ ĝin moralan orientiĝon ne

deduktatan de la religia tradicio mem. Ĉiu formo de kritiko supozigas iun aŭtonomion de la moralo. Akceptinte tiun perspektivon, ni vidas ke judaismo, kristanismo kaj islamo havas ion gravan en komuno. Ĉiuj tri estas t.n. abrahamidaj religioj. Ili estas ŝarĝitaj de la tradicio de Abrahamo, la dia ordon-teorio. Ligas ilin ne religia belaĵo, sed granda problemo. Ja Abrahamo (la ricevinto de la dek ordonoj) ricevis la ordonon de sia dio mortigi sian filon Izaakon. Li blinde obeis la dian ordonon, eĉ kvankam ĝi kontraŭas la sesan ordonon.

Moralo el religia vidpunkto povas esti facile miksita kun iu dia ordono el sankta libro. Do necesas sekvi kritike ĝiajn adeptojn. Ni povas meti kontraŭ ĝin la moralon de laikeco, kiu principe apartigas la eklezion de la ŝtato, tiel ideale kreante neŭtralan ŝtaton. Ĝi garantias liberecon de konscienco kaj vivkoncepto (do kaj pri religio kaj pri nereligio) Laikeco kontraŭas ĉian formon de ŝtata eklezio.

La sola daŭra solvo ŝajnas al mi la forlaso de la dia ordon-teorio. Tio signifas, ke «sanktaj» verkoj ne havu alian statuson ol «normalaj» verkoj. Ili povas liveri utilajn rekomendojn, kiujn ni serioze konsideru. Sed ili ne estu diktajoj, mesaĝoj, ordonoj enmanigitaj de alia mondo! Tiaj tekstoj neniel povos fundamenti aŭ leĝigi la moralon. Se temas pri fundamento de la moralo, ĝi estas afero de la filozofio, precipe de la etiko. En ĝi la humanismo povas ludi gravan rolon.

*Kees Ruij / Malden,
Nederlando*

Ateismo

Organo de ATEO

Legu ĉi tiun bultenon ankaŭ ĉe:

<http://www.gazetotekolanti.com/ateo/ateo08.pdf>

**Retskribu al
jesuo@ono.com**

GRAVAJ NOTOJ:

- 1 Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.
- 2 Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon**.
- 3 Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mis-traktas iun ajn personon.
- 4 Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.

Prezidanto: **Claude Nourmont**, el Luksemburgio.

Vizprezidanto: **Dominique Simeone**, el Francio..

Sekretario: vakas.

Kasisto: **Dieter Rooke**, el Svislando.

Helpantoj pri specifaj taskoj:

Anna Lowenstein, el Italio, kaj

Yamasaki Seiko, el Japanio.

Redaktoro: **Jesuo de las Heras**, el Hispanio.

Kunredaktoro: **Christian Rivière**, el Francio.

Enhavo

Vortoj de l' Prezidanto	2
Grava letero	2
Senĝenaj dialogoj	4
Rimarko	5
La ribelo de ateistoj	6
Senreligia Ĝivan	7
Rimarkoj	7
La iluzio pri dio	8
[...] Al Benito 16 ^a	14
Ateisma moralo	16
UK-aj demandoj	18
Universala moralo sen bazo en religio	23



Kotizo: 15 eŭroj jare.

Kovrilo: Statuo de Hugo Grotius en Rotterdamo. Je 1609 li verkis *Mare Liberum*, per kiu li postulis, ke maroj estas liberaj kaj apartenas al neniu lando.